

# Nova Provo

Organo de NOVO, Asocio por Komuna Ellaborado de Lingvo Internacia  
Numero 9 Januaro 1996

*Por la Internacia Komunikado*

Al la Novistoj:

Karuloj, mi estas nur pli unu inter ĉiuj kiuj serĉas novan internacian lingvon pli efikan kaj pli “taŭgan” ol Esperanto.

Mi tajpis miajn projektojn komputile, kaj jam referis ilin multfoje, pasante de unu versio al la sekvanta kun la helpo de la komputilo, kiu ebligas anstataŭigi literojn kaj skribitajn pecojn facile.

Sed per la legado de *Nova Provo*, mi vidas ke estas multaj aliaj eblaj “lingvaĵoj”, ĉiuj similaj *strukture* al Esperanto, sed kun la ŝanĝo de la alfabeto, de la pronomoj, korelativoj, finaĵoj, ktp, laŭ la plaĉo de ĉiu projektisto.

Certe estos maleble trovi unu unikan “eksteran formaton” de lingvo kiu plaĉos al ĉiuj novistoj, des malpli al la tuta mondo.

Tamen ŝajnas al mi eble, ke la novistoj povos interkonsenti pri unu ĝenerala lingva *strukturo*. Ĝi estos simila al Esperanto, certe. Ni nomu ĝin (almenaŭ provizore) *Bazika* (el *bazo*). El Bazika, ĉiu novisto, kaj poste ĉiu “uzanto”, povus difini sian propran “lingvaĵon”, per sia persona elekto de alfabetaj literoj, pronomoj, korelativoj, prefiksoj, sufiksoj, finaĵoj, ktp, kaj eĉ vortradikoj. Komprenible mi proponas tiun sistemon por ludi ĝin *komputile*, per preparita programo.

Ekzistas nuntempe multaj komputilaj programoj “teksto-ediktoroj”, kiel tiu uzita de mi por tajpi mian lingvoprojekton. Sed ni supozu ke oni povus pli ampleksigi unu bonan teksto-ediktoron, tiel ke ĝi servus ne nur por tajpado de tekstoj, sed ankaŭ havus la proprecon “transkodi” ĉiun tekston tajpitan en unu lingvaĵo de Bazika al kiu ajn alia lingvaĵo de Bazika.

Por uzi la sistemon, la uzantoj farus siajn proprajn lingvaĵojn, laŭ siaj propraj personaj preferoj, tiel ke ĉiu ekstera lingva elemento de kiu ajn lingvaĵo korespondus rekte kaj unike al unu analoga elemento de la baza interna lingvo Bazika. Tio estas, ĉiu uzanto preparus sian lingvaĵon per la simpla tajpado de sia ekstera konkreta prefero por ĉiu elemento de Bazika prezentita per la komputilo, kiel la alfabeto, la pronomoj, finaĵoj, vortradikoj, ktp. Fine, ĉiu uzanto “pensus” en sia propra lingvaĵo, redaktus siajn tekstojn en ĝi per la programo teksto-ediktoro, kaj sendus siajn verkojn per disketoj al kiu ajn alia uzanto de la sistemo. Tiu ĉi, ricevinte la disketojn, povus rapide kaj facile, per la sama teksto-ediktoro, “transkodi” la originalajn verkojn al sia propra preferata lingvaĵo el Bazika.

Mi pensas, ke tia sistemo, se bone konstruita, certe allogos milionojn da uzantoj de komputiloj tra la mondo. Ĝi fariĝos tre interesa ludo, krome al sia precipa funkcio de internacia komunikado. Certe ĝi baldaŭ fariĝos ankaŭ instrumento de gravaj lingvistoj. Kaj la uzantoj povos kontribui por la pliperfektigo de la sistemo.

Je la komenco, la precipa malfacilo de tiu sistemo estos, certe, ĉe la personaj kontaktoj inter siaj uzantoj. La komputilo povos traduki facile inter la lingvaĵoj el Bazika, sed probable la diversaj uzantoj ne tiom facile komprenos per orelo unu la alian. Sed, pacienco! Universala Lingvo vere neŭtrala estas afero nur atingebla en la malproksima estonteco. Ĝis tiam oni devas labori konscie paŝe post paŝe direkte al tiu celo, sed plej demokratie kiel eble.

**Itamar ALVES PINTO, Brazilo (ric. 11.1994)**

## Reagoj al NP 8

(1) Al la nova txfaktivo mi esprimas miayn bondeziroyn, kay dankas lin pro la difino de siay starpunktoy. Miavice, bonvolu koni ke, male kiel vi, mi ne povas esti nek fidela al la Fundamento nek al la Akademio de Esperanto. Ve, miay kruday rimedoy, ne ebligas supersignoyn! Nur txe Novo mi trovas malfermon al nuntempa vivo. Inter la multay proponoy el NP, mi preskau tute konsentas kun la sintezo de Walter Kobelt, en lia artikolo "La angla modelo". Yen loga programo! Se Novo estas por sinergii lau la plano de Walter Kobelt, mi volontas partopreni. Tamen, anstataŭ elekti ĉ, mi adoptas tx, txar tiel oni estas pli sugesta fonetike, pli estetike kay pli universale. Tra la mondo nur kelkay maxinoy ebligas ĉ.

Pierre Estève, Francio (ric. 2.1995)

(2) Mi konstatas, ke ni ambau, malsame sed certe, iel agnoskas la "Fundamenton"! Mi proponas, ke ni regule intershanju niain bultenoin. Aliflanke, se ni kompreneble restos liberai komenti la agadon unu de la alia, shainas al mi bone, ke ni tion faru amike kai ne ataku unu la alian!

Yannic Gicquel, Francio (ric. 3.1995)

(3) Mi ŝatus (r)esti membro de Novo, ĉefe por stimuli klarecon. Laŭ mi Esperanto povas venki terenon nur se ĝi estas pli klara ol la aliaj lingvoj (mi do iom simpatias kun homo Stahl). Se tiu celo necesigas duobligi la vortaron, estu tiel. Duobligon de la literaro (por nomoj de homoj kaj lokoj) mi ankaŭ ne kontraŭos.

Ronaldo Nobel, Nederlando (ric. 4.1995)

## Reagoj de aliaj projektoj

Preskaŭ identajn reagojn ni ricevis de anoj de la du Esperantidaj projektoj *Ido* kaj *Vikto*.

(1) Multa dankon por vua letro [...]. Kaj ni interesas pri adhero ye vua federuro, to ne esas quik simple respondizebla. Por to ni mustus konoceskar precize vua skopi ed anke vidar probo-numero di vua revuo. Se via skopo devus esar la kreo nova internacia linguo lore ni ne kredas, ke bezono existas por to. Ido esas segun nia opinio presente la maxim bona solvuro. Qua deziras la L.I. plu naturalista, ta povas okupar pri Interlingua. Qua deziras linguo kun relative multa adheranti kunagez che Esperanto. Quon vu desprizas che Ido, tale ke vu opinias,

ke es necesa krear plusa linguo? Se vu volas reformar kelko: Linguale kompetenta Idisti volante darfas kunlaborar ye la Linguala Komitato e proponar altrigi, ma vu mustas trovar por to majoritato ye la votadi.

Alfred Neussner, Germana Ido-societo,  
Thüringer Str. 3, DE-37284 Waldkappel,  
Germanio (ric. 2.1995)

(2) Karaj amikoj! Mi ricevis vian interesan revuon de Febr. 1995. Do mi povas kaj devas skribi al vi, ke la problemoj, kiuj vin tuŝas, jam estas solvitaj *per Vikto!* Ĉi-kune mi metas kelkajn Vikto-materialojn, kiujn vi povas studi. Mi esperas, ke vi sendos al mi viajn sincerajn opiniojn.

Wilhelm Bös / Bosz Vilmos, Vikta Filial  
Sopianos, HU-7624 Pécs, Attila u. 19.,  
Hungario (ric. 6.1995; trad. el la germana)

**Red.:** Jen konciza superrigardo pri Vikto:

**Alfabeto:** a, ae [malferma e], b, c [c], ch [ĥ], csh [ĉ], d, dsh [ĝ], e, f, g, h, i, j [j], k, l, m, n, o, oe [ĝermana kaj turka ö, franca eu, angla *or* en *work*], p, r, s [s], sh [ŝ], t, th [angla th, hispana *z* en *paz*, grekaj !!! kaj !!!, islandaj ð kaj !!!], u, v, x [ks], y [franca kaj nederlanda u, germana kaj turka ü], z [z], zsh [ĵ].

**Kazoj:** *nominativo* je konsonanto, -o, -u, -y, -um aŭ -us; *akuzativo* je -on, -un aŭ -yn; *genitivo* je -os, -us aŭ -ys; *nominativo plurala* je -oj, -uj aŭ -yj; *akuzativo plurala* je -ojn, -ujn aŭ -yjn; *genitivo plurala* je -ojs, -ujjs aŭ -yjs. La adjektivoj finiĝas je -a kaj ne estas deklinataj.

**Nombroj:** null, un, du, tri, kvar, kvin, six, sept, okt, nav, dek, cent, mill.

**Personaj pronomoj:** my, ty (On), ry, sy, ly; ny, vy (Onoj), jy. La ĝentilaj formoj estas interkrampe. *Akuzativo* per -n, *genitivo* (posedanteco) per -s.

**Tabelvortoj:** i-, ti-, oti-, li-, kvi-, ali-, ani-, omni-, noni-; -o, -u, -a, -e, -ep, -en, -ex, -am, -ot, -ob.

**Verbosistemo:** *infinitivo* je -i, *as-tempo* je -t, *is-tempo* je -bet, *os-tempo* je -jet, *u-modo* je -j, *us-modo* per -us, *pasivo* per -tur, *participoj* je -a aŭ -e. Kvin aspektoj: *perfekta* je ge-, *incipia* je ek-, *daŭra* je -adi, *frekventa* je -engi, *momenta* je -inti.

**Prepozicioj:** Ĉiu lokoprepozicio ekzistas trifoje: fiksa, enen-direkta, el-direkta; ekz. in/

en/ex, sur/suren/surex, ante/anten/antex, pone/ponen/ponex, inter/interen/interex. Ili tre similas al la Esperantaj, krom hane (= sen), pad (= ĉe), us (= ĝis), ve (= pri), vice (= anstataŭ).

**Afiksoj:** Estas 42 antaŭafiksoj kaj 66 postafiksoj, i.a. arch- (ĉef-), bat- (eks-), eu- (“mal-aĉ”), ha- kaj han- (mal-), mors- (ĝismorte), xeno- (fremd-); -axa (-aĉ-), -ega (-eg-), -ep (-ej-), -etta (-et-), -iado (kunveno), -illo (-il-), -immuna (sen-), -in (-in-), -ing (-aĝ-), -ir (vir-), -jun (-id-), -thek (stokejo, vendejo), -u (-ul-), -ujk (-uj-), -ustro (industrio, -y (-ĉj-, -nj-).

**Vortetoj:** la (la), pli (pli), hapli (malpli), ples (plej), haples (malplej), ajn (ajn), aut (aŭ), dum (dum), ergo (do), et (kaj), kaj (ankaŭ), lie (kiel), naj (certe), nam (ĉar), nek (nek), se (se), sed (sed), ut (ke), ae (ĉu), enk (ankoraŭ), forsan (eble), jes (jes), ne, non (ne), mon (nur), monae (ĉu ne?), vix (apenaŭ), kum (kun, est (estas).

**Ekzemploteksto:** La vikto est la perfektizata variacio esperantos. Esij konkordio per vikto! La vikto helpit pro pax in la mundus. Vivat unessa Europo! La vikto est la lingvo lingvojs. Studij vikte!

Dekanna est la vikto! Praecize nun est dek annoj, ut my editabit in februarius 1981 la unat mikrogrammatikon viktos. Se my retrospektit, potit dici, la vikto gevadibit un triumfa vion. Sur la interlingvistika kampo ly poziturt jam la duat loke, post la esperanto; malgre omnioj, ut la vikto habit enk nonia moneta subvencion, et my facit tia laboron momente mon sole. Kvankam tia problemoj retenit la evidenta viktorton, tamen enk kaj tie la viktista movado progressit et kreskit in rapid-marsh. La vikto kreiturbat pro intelligentia esperantistoj! La esperantismus stagnit panmunde; — dekadit en un hanevolvebla oppozicio. Ma la interlingua habit nonia shancon la celon atingi. Pli praeste-tarde mussijet la esperantistoj evigili et akcepti, ut la vikto est la unika exvio ex tia stagnata situacio, et konkordi kum vikto per esperantista intelligencio.

*Noxkantus viatoros*  
(tradukcio de J. W. Goethe)  
Sur omia akroj  
Est kviet,  
In tota lokoj  
Ty sentit  
Vix un flaton;  
L'ornithoj in la silvo silit.  
Balde ty kvietit,  
Attendij mon.

*Ankoraw neologismoj* (daŭrigota)

Mi sxatus scii, cxu al iu(j) leganto(j) an *Nova Provo* placxas la neologismoj:

**kontinju/i.** (tr) 1) Seninterrompe, kontinue fari, agi ks. 2) Post breva interrompo plu fari, agi ks. Ekz.: Mi kontinjuis labori. Mi kontinjuis an la laboro. Mi kontinjuis legi an la PIVo. Mi kontinjuis an la legado an la PIVo. La storio estos kontinjuata en neksta gazeto.

**ces/i.** (tr) Interrompe, ne agi plu, ne fari plu. Ekz.: Mi cesis labori. Mi cesis an la laboro. Mi cesis skribi an la letero. Mi cesis an la skribado an la letero.

**nupti/i.** (tr) 1) Preni an vir(in)o kiel an edz(in)o. Ekz.: Mi nuptiis an vi. 2) Kunigi an paro kiel an geedzoj. Ekz.: Oni nuptiis an ni. 3) Oficiale deklari kaj registri en civil-aktoj kiel an geedzoj an paro. **nupti/o.** La ago nuptii. **nupti/a.** Rilata al nupti(ay)o. Ekz.: prenuptia interkonsento (angleze *pre-nuptial agreement*). **nupti/ayo.** Post nuptio la vivo det nuptiita paro. Ekz.: Unue nuptio, poste nupto, pli poste konsumato.

**admis/i.** (tr) Permesi akcepti, konsenti akcepti, aprobi akcepti. Ekz.: Li admisis an la kulpo. Oni admisis an li ins hospitalo, universitato ks. Oni admisis an li al advokataro.

**kompu/o.** Pli bona formo ol *komputero*, *komputoro*, *komputilo*, *kompo*.

**pe.** Prefikso montranta an la fina aspekto, *perfektivo*, kiu esprimas an la kompleta ago det verbo. Ekz.: peskribi an letero; pelerni an E.; pelegi an libro; petrinki an lakto; pekonstrui an dometo. Sxajnas, ke pli bone estus havi an sufikso *-ep* por la perfektivo. Ekz.: skribepi an letero; lernepi an E.; legepi an libro (= komplete skribi, lerni, legi).

**ba.** Prefikso montranta an nelegitima infano (ekz.: bainfano, baknabino) kaj an needzecaj gepatroj (ekz.: bapatro). Ekz.: Sxi estas bapatrino kun tri bainfanoj. Noto: ba- el *bastarda*.

**midia.** Kvalita adjektivo, kiu estas inter pozitivaj adjektivoj en malaj signifoj. Ekz.: bona, midia, mava; longa, midia, kurta; multe, midie, poke; varme, midie, fride. Oni vendas an la ayoj en kvar sajzoj: smala, midia, granda, ekstre granda. Cxu vi havas an granda awto? Nen, mi havas an midia.

**va.** Prepozicio signifanta: en la direkto det, en la direkto al. Ekz.: Va kie vi iras? Mi iras va gxardeno. (La celo povas esti antaw, en aw derer la gxardeno.)

Richard Stahl, Usono (ric. 9.1995)

## Transitiveco

Ĉe multaj el la lingvoj indo-eŭropaj ĝenas la memorpreterŝarĝo de la du, aŭ la tri, gramatikaj seksumoj neraciaj. Ĉe la lingvoj bantuaj de Afriko ĝenas simila eĉ pli granda problemo (laŭ nebantuoj!) tiel pro iliaj pli ol deko da gramatikaj “seksumoj”. Ĉe la internacia lingvo tamen ĉio estas racia... Ĉu vere? Aŭ, ĉu ni sugestu, iafoje, ni provas fari iom tro racie, kaj pro tio finfine raciaĉe. Ni aludas la problemon de transitiveco. Problemo ja ĝi estas, kaj la koston de la problemo, krom la memorŝarĝo, ni pagas per malflekseblo, laŭdifinaj eraroj kaj la rompiĝo de la lingvo ĝis du specojn: lingvo skribata kaj lingvo parolata (kaj vivanta).

Jen listeto de radikoj:

1 agord	6 bol	11 kuŝ	16 neces	21 star
2 akcel	7 fand	12 lev	17 okaz	22 sufer
3 akord	8 ferm	13 mort	18 plen	23 ŝanĝ
4 alt	9 komenc	14 mov	19 prepar	24 turn
5 bezon	10 kompat	15 nask	20 pret	25 varm

Ĉu vi scias, sen rigardo en vortlibron, kiuj el ili estas verboj transitivaj kaj kiuj netransitivaj? Nu, kiel vi sukcesis? Ĉu vi trafe kvaroncentis? Jen la verdikto de la *Plena vortaro*:

Verboj tr.: 1, 2, 5, 7, 8, 9, 12, 14, 15, 19, 23, 24

Verboj ntr.: 3, 6, 11, 13, 17, 21

Verboj tr. k ntr.: 10, 22

Adjektivoj: 4, 16, 18, 20, 25

Gramatike, eĉ filozofie, la enkategoriado estas iom arbitra, ĉu inter verboj transitivaj aŭ netransitivaj, ĉu inter verbo aŭ adjektivo. Ni pritraktu unue la temon de la transitiveco de la verboj:

Ni supozu ke sciencisto studis la tri statojn de metalo: solido, likvido kaj (varmege) gaso.

La solidon ŝi fandis, kaj la likvidon ŝi boligis.

Ŝia solido fandigis; ŝia likvido bolis.

Kaj la sciencisto mem?

Estis en 1890 ke ŝi naskigis,

kaj en 1980 ŝi mortis.

En 1890 ŝia mamao ŝin naskis,

kaj estis en 1980 ke la jaroj ŝin mortigis.

Ĉu vere tiuj procedoj de fandigo kaj bolo – du molekulaj procedoj fizikaj de la Naturo – estas tiom malsamaj ke ni bezonas por ilia priskribo malsamajn gramatikerojn? Kaj tiel simile ĉe la dua ekzemplero, ĉu devige ni uzu iun gramatikon kiam ni promenas iudirekte tra

“dogano” kaj gramatikon alian kiam ni alia-direkte ĝin trairas? El ĉiuj popoloj, ne tiel pensu Esperantistoj! Tiom, momente, pri la neracio (aŭ la raciaĉo?) ĉe la verboj. Sekvas iom pri la adjektivoj:

Pri la verbigado de adjektivoj, ni konsideru la tiel nomatan adjektivon “plen”, laŭ ekzemplo el *Esperanto* 1007:11, kie citiĝis iuj vortoj de Zamenhof: “En la frazo ‘la akvo plenigas la kruĉon’ la senco diras al ni, ke la sufikso ‘ig’ estas necesa, kaj uzi la vorton ‘plenas’ anstataŭ ‘plenigas’ mi ne konsilus, ĉar tiam [tiel? –TK] ni tro evidente pekus kontraŭ la logiko...” (per kio, iom pli longe citite, la redaktoro, kvazaŭ trafbrue, finvortis la diskuton). Ni konstata: Zamenhof ne diris, “Mi asertas.” Li eĉ ne diris, “Mi konsilas.” Li diris nur, “Mi konsilus,” kaj ni (ĉiuj kaj ĉiaj) tute ne rajtas uzi kiel bastonon homon respektindan kiu fordonis por ĉiam la evoluon de la lingvo al la mensoj, la koroj kaj la buŝoj de la uzantoj (kaj ne eĉ al la uzantaro)! Zamenhof traktis de tiu frazo la logikon. Ni skribu du frazojn:

La akvo plenigis la kruĉon.

La homo plenigis la kruĉon.

Kion tiel pri la logiko!

Ĉu estas tie malsufiĉo da logiko, ĉu estas jam tro da logiko, aŭ ĉu ni kreis el la logiko senkompatan kaj stultan diaĉon? Se ni diras, “La akvo plenas la kruĉon,” aŭ “La homo plenas la kruĉon,” la frazoj ne estas logike precizaj (nek ili tiel estis kiam ili uzis la konstruon pli longan). Sed la trafa konstato estas: Tute neniel gravas! Ne necesas, ne dezirindas, insulti la intelekton de niaj legantoj aŭ niaj aŭskultantoj. Estus stulte ignori kaj la kuntekston kaj la sencion. Tiuj frazoj mallongaj diras al ni *ĉion* kion ni deziras *ekscii*. Tute ne rajtas la gramatiko sin trudi por babilaĉi plu pri iuj (kaj eĉ tiel ne ĉiuj) el la logikeroj de nia penskonstruado jam komprenita!

Ni pripensu iujn frazojn:

Ŝi naskis sian bebon jaude;

jaude la bebo naskis.

Ni bezonas ses tasojn; ses tasoj bezonas.

Ĉu la akvo bolis kaj fandis la pecoj de glacio?

Jes, mi bolis la akvon kaj

tiel mi fandis la glacipecojn.

Aŭ pli subtile, kuntekstuzante, senregule kaj animgvidite:

Ŝi kuŝigis la bebون.  
Ŝi kuŝigis je la deka horo.  
Ŝi kuŝis dum sufiĉaj horoj.

Li movigis la aŭton post la malfunkcio.  
Li movis la aŭton de la garaĝo ĝis la strato.  
La aŭto moviĝis kiam fine la strato iom klariĝis.  
La aŭto movis tagdaŭre tra la montoj.

Kaj iujn pri verbigado:

Nigras la vespero,  
kaj nigras la kamparon la nokta ĉielo.

Ĉu iu ajn ne komprenus aŭ miskomprenus?  
Ĉu mankas io ajn da *rilata* logiko? (Ne respondu je tiu ĝis vi sukcesis levi tiun homon el la kruĉon!) Ja ili estas klaraj, sendubsignifaj kaj signifoplenaj.

Ni konsilu: Necesas por montri la transitivecon aŭ la netransitivecon nur la kunĉeo, aŭ la manko, de komplemento. Pli ol tiom sen-elekte, tiel la logiko trudas!

**Tony KELLY, Kimrio (ric.: 6.1994)**

*Ĉu reformoj detruus Esperanton?*  
*Respondo al kritikantoj pri la AEIOU-sistemo*

La aserto, ke ĉiu reformo detruus Esperanton, estas ideo, kiu forte enradikiĝis en la oficialan esperantan mitologion, kvankam ekzistas neniu racia kialo por pravigi ĝin. Mi ne volas argumenti, tamen, ke ĉio dependas de ĉu la propono estas *plibonigo* aŭ ne, sed ĉu ĝi estas *utila* al nia movado. Ni ne serĉu diletantan plibonigon. Ne temas pri tio, kaj nek mi nek AEIOU faras tion

Oni devas unue demandi al si, kial lingvoj ŝanĝiĝas. La procedo de ŝanĝoj en lingvo servas por plitaŭgigi ilin laŭgrade al novaj tempoj kaj novaj sintenoj. En la naciaj lingvoj, tiu procedo estas hazarda kaj kaosa. Sed Esperanto ne povas esti kiel ĉiu alia nacia lingvo; en la kazo de nia lingvo *konscia* reviziado estas bezonata.

Kulturoj kiuj volas resti senŝanĝaj, kiuj rigardadas internen, estas ĉiam destinitaj al pereigo. Ĉu ni restu “fundamentistoj”? Mia opinio, ne. Esperanto estas lingvo, kaj movado, kaj ideo, sed ne religio.

Estas evidente, ke Esperanto eksmodiĝis, kaj tial ne allogas la homojn kiel antaŭe. Ni havas seksisman afiksosistemon, kiu ne kongruas kun modernaj ideoj pri egaleco, kaj ni havas alfabeton, kiu ne taŭgas por komputiloj. Se ni ne korektas la problemojn, kaj ne ŝajnigas esti freŝdataj, nia movado daŭros dekadenci.

Nun al la faktoj. Estas asertite, ke “pli kaj pli da komputiloj uzas ankaŭ ĉapelitajn literojn”. Tio ne estas vera. Ili ne *uzas* ĉapelitajn literojn. Ili povas nur aperigi ilin sur la ekrano aŭ elpresi ilin per printilo, kaj nur se la dosieroj por la koncernaj ŝanĝoj estas senĝene haveblaj, se la uzanto scias kiel instalati ilin, kaj antaŭ ĉio, se la gastiga programo estas taŭga por la ŝanĝoj. Oni bone notu: *la ĉapelitaj literoj ne povas esti uzataj en datenarbazoj, aŭ en elektronika poŝto*. Tia ĝenerala subteno por esperantaj literoj neniam okazos.

Jes, dediĉitaj esperantistoj aĉetos la haveblajn esperantajn karaktrarojn, same kiel antaŭe kelkaj dediĉitaj esperantistoj havigis al si speciale ŝanĝitan skribmaŝinon — sed ĝi estas barilo por novuloj. Ni ne restu elita klubo, kie novulo ricevu disketon antaŭ ol povi partopreni. Ni bonvenigu novulojn; ili havu tuj uzeblan alfabeton, nun ke ĝi ekzistas.

Bernard Golden diras, ke estas tute neeble kontroli la plimulton de parolantoj de Esperanto, por taksati la subtenon por tiu propono, ĉar oni ne scias kion signifas “esperantisto”. La sola utila statistiko estas la nombroj de *nunaj aktivaj* uzantoj de Esperanto. Nun tiu nombro koincidas pli-malpli kun la nombro de anoj de UEA kaj asociitaj landaj organizoj. La vero pri tiuj ciferoj publikigaĵas ĉiujare en la paĝoj de la magazino *Esperanto*. Kontroli kiom estas la plimulto ne estus tro malfacile.

Fine, mi ne volas sugesti, ke Zamenhof mem subtenus mian argumenton. Tute ne. Mi volas nur diri, ke estis klare videbla, eĉ en 1887, ke la ĉapelitaj literoj kaŭzos malfacilaĵojn. Kion pensintus Zamenhof ne plu rilatas al ni hodiaŭ. Li ne povis scii tiam, ke nova internacia normo evoluus en ortografio, uzata kaj komprenata pli kaj pli en la nomoj de firmaoj, produktoj, geografiaj loknomoj, ktp., kaj en nove alfabetitaj lingvoj. Tiu normo tiam ne ekzistis, kaj lia solvo estis historie interesa kompromiso inter la orienteŭropaj haĉekitaj konsonantoj kaj la okcidenteŭropaj cirkumfleksitaj vokaloj. Sed ni ne daŭre reklamu strute nian skribmaŝinon en la epoko de lazerprintiloj.

La internacia alfabeto normo aplikata al nia lingvo estas la *Universala Skribo* de AEIOU. La adoptiĝo de universala alfabeto estas la unua paŝo survoje al *efektiva* mondlingvo. Ĝi estas tute subteninda, kaj neniel konflikta kun nia celo. Ignori ĝin kontraŭus la tutan kialon por la ekzisto de nia movado. Ek al moderniĝo!

**Ed. Robertson, Skotlando (ric. 10.1994)**

## *Pri c, k kaj q en internacia lingvo*

Qviel vi jam rimarcas, Linguna (cai ties praeulo Esperanto-Moderna) aspiras respecti la occidentanan, Romanan majoritatan provenon de Esperanto, nome Latinan. Tiel do *c* antau *e*, *i*, *j*, *y*, *ae* prononcsatu como [ts], antau *a*, *o*, *u*, *ou*, *eu* como [k].

Qvaligo: La pópolo Latina plus resto del pópolo Troja, fugijnta el la pituva (sinkinta) Troja urbo en Ásia Minora fondis (post longa interassimilado) la pópolon Romanan en Itália. La Trojanoi ne estiz Hellenoi, sed pópolo parencsa al la Slavoi de Orienta Nordeuropa. Tial illi jam alportiz língue la molligon de diversai consonantoi, do exemple, illi prononcemiz *ki* (Latine *ci*) como [kji], el qvuo iscis *kshi*, el qvuo iscis [tʃi], do el Latinana [kikero], scribita *Cicero* (= kikero), illi pro surtrudo de sua prononcs-praefer [kjkjero] fariz [tʃitʃero], qviel ancorau hódie prononcsaz tion la Italanoi. Pro contracto de paz cun la Latinanoi, la línguo Latina (prastada) respectatis, sed la famílioi Trojanai, qvancam tre apprendemai Latineson, commenciz iom czangji la prononcsan.

La *c* (antau *e*, *i*, *ae*, *y*) solmentau poste czangjidsis al prononcsata [s] (au [θ]) en Francsa cai Hispana línguoi. Pro Nordeuropa esciencso-prononco de la Latina — como línguo esciencista — tiam fixitis [ts] como “gjusta” prononco de *c-elilaely*, cai de tie por Esperanto-Linguna transprenitis tia regulajo. Cai eviteme confusoin, seqve oni devis ecusi *q* como [k] antau *e*, *i*, *j*, *ae*, *y*, inspirite de la Francsa cai Itala *qu*. Cai *qu* por [kv].

La Hellena-Kyrilla eljjetidsis.

Tio est la plej nova stado de studo-etappoi de la Latineso, dum qvuo ancau áliloqe oni trovis parencsagjoin, exemple en la nomigo de paísoi (Germánija = Германия) est ancorau hódie paraleleoi inter ambau línguoi (Slava cai Romana), cai tiel plu.

Hans Dito Goeres, Germanio (ric. 8.1994)

**Red.:** Jen konciza superrigardo de la projekto Linguna de s-ro Goeres:

### a) LA ALFABETO

a, aa [a:], ae [e:] ai [ai], au [au], b, c [ts aŭ k laŭpozicie], c [ts], ch [x], cs [ts], cz [tʃ], d, dj [dʒ], ds [dʒ], dz [ð], e, eh [e:], ej [ei], eu [ø:], f, g, gj [dʒ], h, i, ij [i:], j, jj [ʒ], k, l, m, n, o, oi [oi], oo [o:], ou [ou], p, q [k], qv [kv], r, rr [forte rulata langa r], s[sz], sh [ʃ], ss [s], sz [s], t, th [t + forta h], u, uh [u:], uj [ui], v, w [v], x [ks aŭ gz laŭpozicie], y [y], z(h) [θ], zz [ts].

### b) LA NOMBROJ

1 unu, 2 du, 3 tri, 4 kvar, 5 kvin, 6 sess, 7 sep, 8 oc, 9 naun, 10 dec, 11 ilf, 13 dec-tri, 60 czoc, 100 cent, 144 grozzo, 1000 mill, 1728 cunt. Neregulaj ordonombroj, ekz.: prime, seconde.

### c) LA PRONOMOJ

unuua vertikalo: mi, vi, . . . , dua vertikalo: min, vin, . . . , tria vertikalo: al mi, al vi, . . . , kvara vertikalo: mia, via, . . .

mi	min	me	mia
dzi	dzin	tu	tua
li	lin	luj	lia
shi	shin	sher	shia
id	djin	ei	ea
to	ton	toj	toa (to = li/shi)
ni	nin	nu	nostra
vi	vin	vu	vestra
illi	illin	illur	lora
oni	onin	onu	ónia
si	sin	su	sua

ĉ) LA ZAMENHOFA TABELO plejparte konserviĝis; la okulfrapaj malsamaĵoj estas czi-kaj ómni-por ĉi-, ti-kaj ísti- por ti-kaj qvi- anstataŭ ki-.

d) LA KONJUGACIO estas pli komplika ol la Esperanta. Ĝi distingas kvar grupojn: 1) mi, 2) dzi/vi/li/shi/to/id/oni, 3) ni, kaj 4) la pluralaj vi kaj illi:

-as = 1) -ym, 2) -as, 3) -ams, 4) -az  
-is = 1) kaj 2) -is, 3) -ims, 4) -iz  
-os = 1) kaj 2) -os, 3) -oms, 4) -oz  
-u = 1) kaj 2) -u, 3) -udem 4) -ud  
-us = 1) kaj 2) -us, 3) -ums, 4) -uz.

Aldoniĝas pliaj tensoj.

La verbo *esti* estas neregula:

estas =

1) szum, 2) est, 3) szoms/aro, 4) estaz/aro  
estis =

1) fuvym, 2) fuvas, 3) fuvams, 4) fuvaz.

La participoj estas similaj.

e) La plejmulto el LA AFIKSOJ estas la sama; ekzistas “determinanto-sistemo” por nuancoj kaj derivaĵoj. Karakteriza estas evito de vortoj je mal- kaj vortoj je -ino same kiel eviti germanevenajn radikojn. La plej multaj prepozicioj estas kiel la Esperantaj.

### f) LA FINAĴOJ

-o, -a, -i, -e kaj -n kiel en Esperanto; -j estas -i.

Ekzistas genitivo (je -es, -ois, -ais, -uj), dativo (je -im, -ins, -u), akuzativo (je -n), instrumentalo (je -om, -oi(o)m, -aim, -um) kaj lokativo (-e, -oie).

g) MALGRANDA VORTARO de rimarkindaj kaj ofte trovataj vortoj:

ab = for de  
aedo = aĝo  
-agj- = -aĵo-  
amfí = samtempe ambaŭflanke de  
anau = alten, supren, al sur  
antí = ŝtorme kontraŭ  
apprendi = lerni  
borri = forigi  
cadi = fali  
cai, kái, ac = kaj  
como = kiel  
cruí = stamfi  
del = de la  
dujto = filino  
dyni = fortopovi  
ec- = ek-  
edí = kaj ankaŭ, kaj krome  
-eiko = -istino  
epí = al ĉe  
-ezz- = -ec-  
femino = virino  
foajo = fojo  
garau = proksimume  
grauso = maljunegulino  
guerro = milito  
-iczoj = vir-  
-ids- = -iĝ-  
isci = fariĝi  
ja = ja  
katau = malalten, malsupren, al sub  
kogni = koni  
la, le, lo, . . . = la  
laiqi = ŝati  
lexo = vorto  
losha = malbona  
maiko = patrino  
mejdo = knabino  
mentau = sed (postpozicia)  
mudari = ŝanĝiĝi  
nuj = nu  
nyin = nun  
omrazo = malamego  
ostavi = tute lasi de  
paíso = lando  
paula = malmulta  
paz = paco  
pejno = malsato  
pemfi = sendi  
piti = sinki  
pli, plej, ol = pli, plej, ol  
pr(a)e = antaŭ (tempe)

qvau = favore al  
qve = ke  
reqva = ĉar  
rheío = rivero  
seqvum = laŭ  
shola = malprofunda  
solmentau = nur  
spuzo = edzino  
stado = stato  
syn = kune kun, kunen, kunige  
sze = se  
theao = diino  
ticha = mallaŭta  
tum = tiel longe kiel  
tunk = post tiam  
tyga = taŭga  
un, una, unuj, . . . (nedif. art.)  
utra = unu de nur du  
vanui = formalaperi  
vito = vivo  
vivi = vivi  
wailo = mallonga daŭro, tempospaco  
wronga = malĝusta  
xena = alfremdiga  
xera = elsekigita

#### NOVAJ MEMBROJ

D-ro Bodo Schneider, Moelenwisch 20 A,  
DE-22453 Hamburg, Germanio  
S-ro U. Zeiter Perera, 197 Indivitiya Road,  
Hettigama, Ja-ela, Srilanko

#### ADRES-ŜANĜO

D-ro Janus Di Censo, Via Quarenghi 40/  
28, IT-20151 Milano, Italio

#### DIVERSAJ NOTOJ


Dum la 5-a Jarkunveno de GIL (*Gesellschaft für Interlinguistik* = Societo por interlingvistiko) en Berlino de 24 ĝis 26 novembro 1995, d-ro Janus Di Censo el Milano prezentis siajn novan libron kaj projekton Trasermo. Li verkos artikolon pri ili por estonta NP.

Ekde NP 10 estos Claus J. Gunkel (Nikolao J. Gunkel), kiu ne nur redaktos, sed ankaŭ kompostos ĉiujn numerojn. Do bonvolu poŝti ĉiujn artikolojn al nur li. Pri la NP-dissendado daŭre respondecos Roy McCoy.


## La ŝuŝokubo

Centra punkto rilate al propono de nova alfabeto estas la ŝuŝaj sonoj *s, z, ŝ, ĵ, c, dz, ĉ kaj ĝ*. Tio ne estas miraklo, ĉar la duono el ili estas supersignaj kaj du el ili (*ĵ kaj ĝ*) estas tiel similaj, ke multaj proponoj kaj projektoj elĵetas unu el ambaŭ. Krome *c* estas pridiskutata: ĉu [ts] estu bonvena en internacia lingvo? ĉu pli bone *c* por la sono [k] en internacia lingvo? Kvin el la supre menciitaj ok ŝuŝaĵoj troviĝas en la artikolo de Tony KELLY sur p. 58.


La ŝuŝokubo helpu pritaksi la unuopajn proponojn. La ok sonoj troviĝas sur la ok verticoj de la kubo. La tri dimensioj signifas tion ĉi: malsupren iras la afrikatigo, dekstren iras la gingivaligo, antaŭen iras la voĉigo:




Multaj sentas la mankon de simetrio en la ŝuŝokubo de Esperanto. Ekzemplo estas Pranunitario de RIEHM, kie la supersigno Esperanta servas nur por la voĉigo, dum la afrikatigo estas respektive indikata de *d* kaj *t*. (*Rim.*: Ekde ĉi tie ne plu necesas indiki la sagopintojn.)




Alie agas la EPS-propono (NP, p. 62), kie la supersignoj utilas por la gingivaligo:




Laŭ mia scio ankoraŭ ne ekzistas propono, kiu utiligas supersignon nur por indiki afrikatigon. Ĝi estus tia ĉi:




Tiel ĉi aspektas la AEIOU-alfabeto kaj la propono de ROBERTSON (NP, p. 21) ŝuŝokube:




Jen la reforma alfabeto de FRANK (Barandovská [eld.]: *Klerigkibernetiko*, vol. 6, p. 248) ankaŭ proponita de PINTO (NP, p. 22); ĝi estas simetria:



Jen la alfabeto uzita de DALTON (NP, p. 63-64); ĝi ne estas simetria:



Kaj liste laste de DAO (NP, p. 10):



Claus J. GÜNKEL, Germanio (ric. 12.1994)